



NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
„La Estonto Estas Nia” - 32-a jaro n-ro 4

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.
Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

KIO ESTAS AGADO E₃?

Ĝi signifas: „Esperantistoj Esperigas Esperantojn”.

Nia mondo nombras ĉ. 15.000.000 blindulojn, el kiuj ĉ. 10.000.000 estas *nenece* blindaj. Ili loĝas ĉefe en Afriko. Nesufiĉe estas konate, ke la plej multaj el ili povus vidi, se oni povus doni la necesan helpon pere de operacio aŭ medikamentoj. Sed tio kostas monon, multan monon. Estas kulpigo kontraŭ „nia” civilizado, ke milionoj da blinduloj restas blindaj pro manko de helpo.

La famkonata okulkuracisto Prof. d-ro H. J. M. Weve, kiu ankaŭ ekster la nederlandaj landlimoj akiris reputacion, vizitis Afrikon antaŭ kaj post la dua mondmilito. Lin tiom trafis la multaj suferoj, kiujn li vidis, ke li kun kelkaj amikoj priensis planojn por organizi helpkampanjon. Pro sia morto en 1962 li ne povis realigi ilin, sed liaj amikoj daŭrigas lian laboron pere de institucio en Wassenaar, portanta lian nomon, kiu celas okulkuracian helpon al blinduloj en afrikaj landoj evoluantaj.

En la somero de 1965 d-ro L. L. H. Sampimon, nuna prezidanto de la Prof. Weve Institucio, faris orientiĝan vojaĝon al diversaj afrikaj landoj, i.a. Kenio, Tanganjiko kaj Ugando. En Afriko li interkonfiliĝis kun la aŭtoritatuloj, por ke la helpo

atingu la plej bonajn rezultojn. D-ro Sampimon venis al la terura konkludo, ke unu el ĉ. 60 homoj en Kenio estas blinda kaj ke unu el ĉ. 160 homoj estas blinda pro katarakto. Laŭ ĉi tiu specialisto 80% el ili estas *nenece* blindaj, ĉar oni estis povinta preventi ilian blindecon aŭ povas nun kuraci ĝin.

Dum vizito al gento Masaj'a montriĝis, ke la tuta loĝantaro suferas pro traĥomo (infekta okulumalsano), kiu sen kuracado ofte kaŭzas blindecon. La nombro da okulkuracistoj en la diversaj landoj estas bedaŭrinde malaltega, kio estas granda problemo.

Dum sia vojaĝo D-ro Sampimon havis la privilegion revidigi plurajn blindulojn pere de simpla operacio. Kiam li laboris ĉe la gento Masaj'a, la rektaj kostoj de unu katarakta operacio estis malpli ol dek „steloj” (ned. guld. 2,50) . . . Per tia monsumeto malfeliĉa homo fariĝas iu, kiu povas perlabori sian panon! Ĉiu el ni havas la moralan devon kolekti la necesan monon. Nur tiam ni povos grandskale prezenti helpon al tiom da *nenece* blindaj homoj! Estas okulkuracistoj en Afriko, kiuj faras 50 kataraktajn operaciojn en unu horo . . . El ĉi tiuj 50 pacientoj estas almenaŭ 49, kiuj post la operacio kapablas kulturaj kampojn kaj prizorgi sian brutaron!

ASOCIAJ INFORMOJ

Gazetarservo.

Dum la jaro 1966 aperis en la nederlanda gazeto entute 186 artikoloj kaj komunikoj pri Esperanto.

Inter la artikoloj estas kelkaj pli ol duonpaĝon grandaj, kun fotoj.

Pri la peticio al U.N.O. skribis multaj gravaj gazetoj en Nederlando. Ni dankas al ĉiuj kunlaborantoj, kiuj aperigis la artikolojn kaj komunikojn kaj sendis ilin. Volonte ni ankaŭ ĉi-jare ricevos ĉion, kio aperis kaj aperos en la ned. gazetaro.

J. Hoekstra-Sieders,
Frederikslaan 47, Schoorl.

En ĉi tiu monato ni memorigos je la 14-a de aprilo la 50-jaran datrevenon de la mortotago de d-ro L. L. Zamenhof. Ĉiu esperantisto scias, ke li, la pola okulkuracisto, prefere helpis malriĉajn pacientojn. Li ofte faris tion senkoste. Opiniante, ke la idealo de la Prof. Weve Instituto estas simpatia en la vidantaj okuloj de ĉiu vera adepto de *nia* okulkuracisto, mi venis al ideo, kiun mi unue proponis al la membraro de Internacia Katolika unuigo Esperantista. Ĉar jam envenis multaj mondonacoj de esperantistoj nekatolikaj, mi ne povas plu paroli pri „kampanjo de I.K.U.E.“, sed temas nun pri agado de la tuta esperantistaro. La kostoj de unu katarakta operacio sumas ĉ. ned. guld. 2,50. Ĉu estus eble, ke ĉiu esperantisto pagus almenaŭ unu operacion, ekzemple kiel dankesprimon honore al d-ro Zamenhof?

Jacques Tuinder,
Van Hulststraat 1,
TER APEL (Gr.) Nederl.

Oni povas pagi al:

- J. A. Tuinder en TER APEL, ĝirkonto: 10 20 100.
- Prof. Weve Instituto, Groot Haesebroekseweg 12, WASSENAAR, ĝirkonto: 20 18 00 (en tiu kazo vi bonvole sendu vian nomon al J. A. Tuinder en TER APEL!).

AGADO E3 sendos la tutan mondonacon de la esperantistaro al la Instituto la 15-an de decembro 1967-a!

Libroj al Brazilo.

Plenumante peton de la Direktoro de la Esperanto-Kurso de la Universitato Federacia de Ceará, S-ro Paulo Amorim Cardoso, nia estraro sendis kiel kontribuon al la biblioteko de la Esperanto-Centro sekvantajn librojn el nia stoko de duoblaĵoj de nia biblioteko:

„Idoj de Orfeo” de Bulthuis; „En la lando de la Blanka Monto” de L. Huot-Sordot; „Por la honoro de nia Lando” de A. Viruly; „Riĉa kaj sen Mono” de P. Oppenheim; „La blankĉevala Rajdanto” de T. Storm kaj „La Fino” de F. Bernadotte. Ĉar ni jam forsendis la pakajon en la komenco de oktobro 1966 kaj ni ne ricevis iun ajn reagon, ni devas kun bedaŭro konkludi ke la sendaĵo perdiĝis.

EL LA SEKCIOJ.

Sekcio Zaandam.

P. L. Takstraat 64.

Eksiĝis kiel estraraninoj dum la sukcesplena jarkunveno la samideaninoj B. Baartse-Peijis kaj J. Schone-Slot. Por ili elektiĝis la samideanoj B. Backer kaj J. K. Hammer. La tagestraro nun estas: prezidanto J. L. W. G. Fortuin; sekretario J. Vis; kasistino A. Wester-v.d. Veen. La malnovaj estraranoj L. Driesten kaj J. Snel kun la ĵus elektitaj ankoraŭ dividis la vakantajn funkciojn. Pri la rezulto vi povos ĉion aŭdi je nia aprila distra kunveno kiu okazos la duan lundvesperon, do la dekan de aprilo en De Harmonie, Rustenburg 71C, Zaandam.

Sekcio „Unueco”, Krommenie.

Sekr.: Popelstraat 13.

En la jarkunveno ĉiuj raportoj estas aprobitaj. La kunveno akceptis la estraron neŝanĝita. Tio signifas, ke la sekvantaj personoj estas reelektitaj en siaj funkcioj: s-ro Hogenkamp, prezidanto; s-ro Fischer, ĝenerala estrarano; s-ino Van der Meulen, sekretariino.

Pro multa laboro deziris eksiĝi nia kasisto, plenuminte tiun taskon dum 5 jaroj. Por anstataŭi lin oni unuanime elektis s-inon Peper-Nierop.

Pri la 15-a Feriosemajno Krommenie vidu sub: *Kongresoj kaj Kunvenoj.*

S-ino C. J. Roskes-Dirksen †

La 21-an de februaro mortis en Hago s-ino Catharina Julia Roskes-Dirksen, la fratino de s-ino Julia Isbrucker-Dirksen. Multaj Nederlandaj Esperantistoj lernis la lingvon per la malgranda lernolibro „Methodisch Leerboek voor de Internationale taal Esperanto” de la fratinoj C. J. kaj J. C. Dirksen.

S-ino Roskes esperantiĝis jam en 1907 kaj instigis siajn gebofratojn fari same, sekve de kio Ges. Isbrucker eklernis la lingvon en 1909.

S-ino Roskes estis Landa sekretariino de la Vegetara Ligo Esperantista.

Ŝi verkis diversajn kantojn el kiuj estas plej konataj: „Ses Kantoj” kaj „Kvin Vivokantetoj”, kiuj estas premiitaj kaj menciitaj de la „Floraj Ludoj” en Katalunujo (1926-27-28).

Ankaŭ la edzo, la konata pentristo Daan Roskes, kiu jam antaŭe mortis, estis Esperantisto, same kiel la gefiloj s-ino Hetty Bersma-Roskes en Zandvoort kaj s-ro Julius Roskes en Scheveningen, kiujn ni kore kondolencas.

E. S. Otto.

ĜENERALA NEDERLANDA ESPERANTO-EKZAMENO-KOMITATO

	Ricevitajoj	Eldoj
Kaskonto 1966.		
Saldo 1965	431,—	
Kontribuo N.C.E.V.	15,—	
Kostoj jarkunveno		123,95
Kostoj Amersfoort 28/5		
ricev.	344,75	
eld.	195,40	
	—	149,35
Administrataj kostoj		57,60
Presadoj		73,21
Ĝiro (repagitaj ĝirslipoj)	1,44	
Rezervo por ŝranko		250,—
Saldo 1966		92,03
		—
	596,79	596,79

(La jarraporto jam aperis en la marta numero de „N.E.”).

U.E.A. bezonas vin. Vi bezonas U.E.A.-n.

fariĝu ankaŭ vi membro-abonanto de U.E.A.

Petu pri tio informojn al la kasistino de L.E.E.N.

Helsingör

La internaciaj ferijaj Esp.-kursoj okazos 23—30 de julio en la internacia Altlernejo (tute-modernigita) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Abyhøj, Danlando.

N.B. Aŭtunaj ferijaj Esp.-kursoj okazos en la alternejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Arhus, Danlando, 15—21 de okt. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

KORESPONDPETOJ.

Jozef Pigiua, RUDA Sl. 9; ul Rudzka 4, Katordice, Pollando, 16-jara, dez. kor. pri pm., bildk., geaktorj.

Ryszard Marianski, LODZ 43, ul. Kosmonautów 2 m 44, Pollando, dez. kor. kaj interŝanĝi poŝtm.

F-ino Evelyne Schwinn, 45 Sceaux du Gâtinais, MONTARGIS (Loiret), Francujo, dez. kor. kun 16-20 jara junulo. Ŝatas modernan muzikon, legi kaj desegni.

S-ro Siegfried Furkert (17-jara), Göttingerstrasse 1, kaj s-ro Rudolf Seifert, Amseisteg 4, ambaŭ 8054-DRESDEN, Germanujo (DDR), dez. interŝ. bildk. kun samidean(in)oj.

F-ino Iaeko Suzuki (19-jara), Kobajaŝi, Macunami 4-21-11. Ĉiba-ŝi, Ĉiba-ken, Japanujo, dez. kor. pri sportoj (pingpono, baseball).

Studentoj de la Ĉiba-Universitato Esperanto Klubo, JAJOI, Ĉiba-ŝi, Ĉiba-ken, Japanujo, petas por sendi esp. gazetojn pri Nederlando kaj dez. kor.

KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ

52-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

Tel Aviv, 2—9 Aŭgusto 1967.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO.

N. 5.

Loĝado. Pro ĝia graveco ni deziras ankoraufoje atentigi la interesigantojn, ke LKK povos akcepti mendojn por loĝado nur ĝis la 1-a de majo 1967. Post tiu dato LKK ne plu povos certigi loĝadon. Personoj, kiuj intencas aliĝi al la Kongreso post tiu dato, devas tion nepre atenti kaj zorgi pri sia loĝado pere de vojaĝoficejo en sia lando.

Foto-Konkurso. Ni atentigas, ke la konkursaĵoj por la Foto-Konkurso ĉijara devas atingi antaŭ la 1-a de julio 1967 la jenan adreson: 52-a U.K. de Esperanto, P.O. Box 1289, Tel Aviv, Israelo. La temo de la ĉijara Konkurso estas:

„Moderna Arkitekturo (en ligo kun la Jaro de Internacia Turismo”.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

15-a Internacia Esperanto-Ferio-Semajno
30 julio-7 aŭgusto 1967 en Krommenie, Nederlando.

Provizora Programo:

Dimanĉon : Alveno de la gastoj.

Lundon : Oficiala akcepto; Ekskurso tra Zaanregiono; Interkonatiĝa vespero.

Mardon : Ekskurso al Amsterdam.

Merkredon : Ekskurso al Hoorn kaj Sudmara Muzeo (Enkhuizen).

Ĵaŭdon : Vizito al Marken kaj Volendam.

Vendredon : Ekskurso al Hago.

Sabaton : Libera tago kaj festvespero.

Dimanĉon : Libera tago.

Lundon : Forveturo de la gastoj.

Pli detalajn informojn donas s-ino J. A. v.d. Meulen-van Harten, Popelstraat N 13, KROMMENIE, Nederl. Limdato de aliĝo: 1-5-1967.

Eŭropa Esperanto-Kongreso
Innsbruck, Aŭstrio.

23—30 julio 1967.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) decidis samtempe okazigi la ĉijaran ĉefkunvenon en Innsbruck. Informas: F-ino J. Dedieu, Avenue Victor 70, 31 TOULOUSE - 04 Francujo.

Someraj Kursoj en la „Muelejoj de la Metilernantoj”, Francujo.

(vidu i.a. „N.E.” de marto 1966).

Informojn, dokumentojn k.t.p. volonte sendos H. Bakker, Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z.

FERIAJ ESPERANTO-KURSOJ EN HELSINGÖR, DANLANDO.

Ankaŭ ĉi tiun jaron okazos la konataj feriaj kursoj en Helsingör, nome de 23—30 julio. Vidu la anoncon en tiu ĉi numero.

Faldfolio kun aliĝilo havebla ĉe s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, ABYHÖJ, Danlando.

KONGRESO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO.

Dum la tagoj 13—15 majo okazos Kongreso de Norvega Esperantista Ligo en Saŭda, loko kun proksimume 5000 enloĝantoj kaj tre vigla Esperantoklubo en la okcidenta fjordregiono inter Bergen kaj Stavanger. Eksterlandajn gesamideanojn kiuj ĝuste tiam, kelkajn tagojn antaŭ la malfermo de la Internacia Festivalo en Bergen, troviĝas en tiu turisme tre ŝatata parto de Norvegio, la aranĝantoj ĝoje bonvenigos en la kongreso. Informojn donos: Norvega Esperantista Ligo, Boks 942 Sentrum, Oslo 1.

Dua Internacia Esperantista Ferio, Miedzygorze - Pollando, 7—20, X, 1966(!).

Laŭ aldonita klarigo ĉiuj informoj restas daŭre aktualaj por la venonta Tria Internacia Esperantista Ferio, kiu okazos en septembro 1967, denove en Miedzygorze. La broŝuro estas kontraŭ unu rpk. havebla ĉe: Pola Esperanto-Asocio, Okcidenta Regiono, WROCLAW-17, P.K. 8, str. Dubois 3, Pollando.

TRA LA LIBRARO.

TAGKAJERO EN PRIZONO, de Ho chi minh. El la ĉina tr. Dao anh kha. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1966. 106 p., 19 x 13 cm., il. Poemaro.

En la enkonduko estas rakontite, kiel Ho chi minh, la nuna prezidanto de Nord-Vjetnamio, en 1942 estis arestata de la polico de Ĉiang Kajŝek, kaj pri lia restado en diversaj malliberejoj en Ĉinujo. Tie Ho chi minh verkis la ĉi tie kolektitajn poemetojn pri la ĉiutagaj travivaĵoj, simplajn kaj homecajn notaĵojn.

Tiu poemaro helpas nin iom pli bone ekoni homon, tiel gravan en la nuntempa politika situacio.

H. G.

KIE BOACIOJ VAGADAS, originale en Esperanto verkita de E. Salovaara. Eldonis: Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, Abyhøj, Danlando. Broŝurita, 70 p., 15 x 21 cm. Prezo 7,50 dkr. Havebla ĉe nia librosservo.

La verkistino de la libro „Sub la signo de la verda stelo” denove aperis en la „verdan” lumon per nova novelaro. En ĝi S-ino Salovaara rakontas pri la homaj sortoj en la plej norda Finnlando, pri superstiĉo kaj mistiko. Poezie ŝi rakontas pri la belaĵoj de la naturo, pri ĝiaj solecaj arbaregoj kaj pri ĝiaj vastaj tundroj. Per sia kolorriĉa stilo ŝi scias kapti la leganton kaj sentigi la magion de la nordo. „... estas multe da misteroj en la mondo, precipe en la regionoj, kiujn la homa moderna materi-ama civilizacio ankoraŭ ne difektis, kie ankoraŭ vivas la Naturo en la kadro de senfinaj susurantaj arbaregoj, kie ankoraŭ ŝaŭmas nekatenite sovaĝaj riveroj kaj kie la vojoj estas nur piedireblaj mallarĝaj pasejoj, faritaj de migrantaj boacoj”.

Ĉiu el ŝiaj noveloj havas apartan sferon. Jen poezie pentrane la kolorriĉon de la naturo, jen streĉe priskribante katastrofan inundon pro ŝveliginta rivero, jen sprite rakontante la trompon de fantazie-ma maljuna laponino, jen elokvente laŭdante la heroan savon de malsaniĝinta patrino. En la bela stilo kaj bona lingvo-uzo nur kelkajn makuletojn mi rimarkis. Ekzemple la tute superfluan uzon de „nune” anstataŭ „nun”, la uzon de „pri” en la frazoj: „... je memoro pri la episkopo” p. 33) kaj „... nenio plu estis

videbla pri la loko” (p. 40). Sur paĝo 55 la verkistino „brute” interrompas la vortotorenton de amikino. Mi preferus „abrupte”. Sur paĝo 59 la uzo de „surprize” en la frazo „ni finfine surprize vidis soldatan helikopteron” devas esti „surprizite”. Evidenta preseraro estas „tiarano” (p. 29). Devas esti „tirano”. La ĝuanta leganto cetere konsideros tiujn „makuletojn de beleco”.

R. S.

NI RICEVIS:

DESIRI LA MASKON DE „LIBERECO, EGALECO KAJ FRATECO” DE LA BURGARO, Ĉefartikolo de Renmin Ribao (Popola Ĵurnalo), 4 jun. 1966. 24 p. 9½ x 14½ cm., broŝ. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Prezo: gld. 0,25. Havebla ĉe: Librosservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P.O.-Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

INTERNACIA ĴURNALISTO. Organo de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA), decembro 1966, n-ro 4, Redaktoro: Ivan Keremidĉiev Esperov, blv. Hristo Botev 98, SOFIA 2, Bulgario.

Tabelo de la Enhavo kaj Paĝo-Specimenoj de la dulingva (hispana-Esperanta) eldono de: El Hombre en su Camino/ La Homo sur sia Vojo, Krestomatia Lernolibro Hispana-Esperanto, de Prof. Manuel Fernández Menéndez. Eld.: „La Bona Semisto”, Montevideo 1965. Mendebla ĉe U.E.A. Prezo Us. dol. 4.00. Kun artikoloj i.a. pri la Uno, la Homaj Rajtoj, Zamenhof, Esperanto kaj Unesko, k.t.p.

TERMOJ DE MONTECATINI, esperantlingva informilo pri mineralakva kuracado en la Itala urbo Montecatini. Por informoj oni direktu sin al: Direzione Terme, MONTECATINI-TERME, Pistoia, Italujo.

„De Drommedaris”, Internacia Studentcentro, Enkhuizen, Holland (Internacia Studenta Centro). Dulingva - nederlanda/esperanta - faldfolio, pri la konferenceto, kie okazos la Eŭropa Junulara Konferenco de 19 ĝis 29 aŭgusto 1967. Plaĉa ilustrita informilo kun aliĝilo. Pli detalaj informoj haveblaj ĉe la Centro, Poŝtkesto 50, ENKHUIZEN, Nederlando.

PAROLAS LA LEGANTOJ.

(la redakcio ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj)

Kleriĝu ni!

Legante la februaran numeron de Nederlanda Esperantisto kaj en ĝi la raporton pri la Zamenhof-kunveno en Groningen, mi sentis kreski en mi la deziron „kleriĝi en kaj pri Esperanto, por ke „ankaŭ mi „kun certeco, inde kaj fundamente povu defendi Esperanton al kontraŭuloj”.

Jes ja, ne facila tasko por tia ulo kiel mi, kiu post preskaŭ kvardekjara supozita aŭ imagita esperantisteco (-ita, ĉar mi jam perdis la iluzion!) devas konstati ke la lingvo Esperanto estas al li ankoraŭ (aŭ eble: fine) tiel enigma, ke li ne sciis kiel ĝin defendi „inde kaj fundamente, kun certeco”!

Por ĉerpi kelkajn ekzemplojn el la sama numero: sur p. 16, en invito al la eŭropa esperanto-kongreso, mi legas pri „*vehemenca* forto” kaj konstatas ĉe mi hontigan mankon de erudicio, ĉar mi vere ne scias ĉu la aŭtoro aŭde kopiis unu el la freŝdataj neologismoj de d-ro Kalocsay, aŭ ĉu li mem suĉis ĉi tiun superfluaĵon el sia dikfingro, aŭ ĉu mi havas antaŭ mi honorindan vorton Esperantan laŭfundamentan, t.e. laŭ la fifama 15a regulo de la Fundamento de Esperanto.

Kelkajn bagatelojn ni pretervidu kaj ni transiru de la leksikologio al la gramatiko. En la ĉefartikolo, de iu R.S., en la 7a linio antaŭ la fino, mi legas: „En Hazebroek estas . . . unu instruisto, *pagita* de la franca ŝtato, kiu instruas ekster la ordinaraĵoj horoj la nederlandan lingvon al volontuloj”. Kiel do?!

Ĉu la franca ŝtato antaŭpagis al tiu instruisto la tutan salajron aŭ honorarion, ĝis la momento de ties pensiigo? Aŭ ĉu la instruisto nun - pro pura amo al la afero - daŭrigas sian laboron senpage? Kiaj nekredablaj aferoj ekzistas en ĉi tiu mondo - kaj en ĉi tiu lingvo!

Sur la sekvanta paĝo, denove en la raporto pri la Zamenhofkunveno, mi legas ke „la prezidanto . . . bonvenigis . . . s-ron S. Stuit el Francujo, kaj afrikan studenton, akompanitan de li”, kaj mi miras pri la malafableco de mia amiko Stuit, ke li forlasis la afrikan studenton kiun li akompanis.

Sur p. 18, dekstre malsupre, mi legas: „Ĉiu valorajo kultura de ĉiu ajn popolo devas esti konigita al ĉiuj”, kaj mi de-

mandas min, ĉu tiu konigado de iu kultura valorajo iam finiĝas? Ĉu ne ĉiam novaj homoj naskiĝas al kiuj oni devas konigi ĝin? Kiel do mi devas interpreti tiun „-ita”?

Ni demandu pri tio nian Papon en la Verda Vatikanurbo, Wembley, ĉar ankaŭ mi ja strebas por kleriĝi, kvankam bedaŭrinde vane.

Soest.

D-ro W. P. Roelofs.

Reĝustigoj.

Prof. G. Waringhien, Vitry-sur-Seine, Francujo, sendis al ni leteron, en kiu li faras kelkajn rimarkojn rilate artikoloj. aperintaj en la februara numero de „N.E.”.

G. J. Degenkamp pro tio skribas:

Mia recenzo pri „La tragedio de l'homo” en la februara N.E., bezonas du reĝustigojn:

Mi menciis en ĝi uzon de *kreata* anstataŭ *kreita*. Konsidero pri antaŭirinta teksto pruvis, ke *kreata* estas uzita ankaŭ konforme al la itisma koncepto, ĉar la origine perfektiva verbo *krei* ĉi kaze esprimas progresivon.

Due, prof. Waringhien atentigis ke la enkonduko estas verkita ne de Kalocsay, sed de István Sötér. Prave! Sed ĉar mi konstatis ke stilnuancoj, neologismoj kaj similaj privataĵoj de Kalocsay estis tiom similaj al tiuj de Kalocsay mem, mi ne povis ne senti en ĝi ties lingvan influon. La indikativon post *kvazaŭ*, tie trovitan, mi menciis kiel ĝojigan fakton pri iom da lingva libereco.

Plue Prof. Waringhien rimarkigas:

P. 14, via kontribuanto R. S. asertas, ke „Rijssel” situas en la nederlande parolante parto de Francujo”.

Naskiĝinte mem en „Lille” (de latina etimologio: „la insulo”), mi povas certigi lin, ke, kvankam oni antaŭ longe diris „Lille en Flandre”, oni efektive neniam parolis en ĝi la flandran lingvon, ankoraŭ malpli la nederlandan. La flandra-parolanta parto iras de Hazebrouck ĝis la maro, sed la loĝantoj estas ĉiuj dulingvanoj.

Eseranto en Komercio - kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo: gm. 2,—, ekde 10 libroj gm. 1,35.
Esperanto-Rondo, 718 Crailsheim, Germanujo.

Simon Carmiggelt:

IDEALOJ

Kiam ni en la vespero promenis tra la vilaĝo al la lasta aŭtobuso, ni preteriris la domon. Sinjorino Puts senmove sidis sub la krepuskuma lampo en la verando kaj rigardis antaŭ si. Ŝi ege blankiĝis sed ŝi ankoraŭ ĉiam portis la hararon en la mezo disiĝe kaj kun tiuj plektaĵoj orname sur ambaŭ oreloj, same kiel tiam.

Tiam estis antaŭ tridek kvin jaroj. Ŝi ankoraŭ loĝis en la urbo, kun sinjoro Puts kaj filo Gerrit, kiu estis lernejo-amiko mia. Palaj puboj dekkvarjaraj ni estis kaj ŝi estris nin fiksbride. Ĉar ĉion ŝi sciis tute certe. Sinjoro Puts ne. Tiu nur iom ridetumis, plejofte envolvita en mallonga, nigra ŝultromantelo, tiel ke ofte oni supozis lin leterportisto, malgraŭ ke li estis talenta dentoteknikisto.

Sinjorino Puts altis apud li kreska kaj malplatega. Ŝi estis idealistino, kun voĉo laŭtsona, ekzercita dum la debatkunvenoj. Kion ŝi precize agnoskis, tio neniam fariĝis tute klara al mi, sed certis, ke hejme ĉe Gerrit oni ne vivis senpripense. Alkoholaĵoj aŭ viando ne venis tie trans la sojlon. Ofte oni manĝoproponis tranĉaĵon da avenmalto kaj la kuirejo plenis de boteloj kaj potoj, kiuj portis la ŝtampon „aprobata de la nederlanda asocio de vegetaranoj”, kvazaŭ agnosta „rabena kontrolo” kiu sanktigas manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Pomo kaj piro ne naŭzis ilin, sed la grajnoj vi ankaŭ manĝu kaj per la dentoj vi muelu la grenetojn „ĉar en ili nun ĝuste estas la plej gravaj vivosukoj, ĉu?”

Sinjorino Puts agadis daŭre. Ekzemple ŝi frekventis en hejmoj por elperforti de homoj la promeson, ke ili sin bruligu siatempe, ĉar ŝi estis estraranino de unu-ĝo kiu volis, ke la tuta nederlanda popolo estu cindro kaj ofte ŝi amarece parolis pri la kulto de la entombigado. Multon el sia senlima energio ŝi ankaŭ investis en klubon, kiu defendis la paroladon de Esperanto, „ĉar ĉiuj tiuj militoj nur estiĝas el la fakto, ke la homoj ne komprenas sian reciprokajn lingvon, ĉu vi scias,

buboj?” Mém ŝi flue parolis la ĉarmetan idiomon. En la somero ŝi regule gastlogiĝis Finnojn, Hungarojn aŭ Sudeto-Germanojn, kiuj venis nur ĉar ili estis ankaŭ Esperantistoj. La domo tiam pepis pro la mondlingvo. Gerrit, kiu proteste estis rifuzinta sinkapabli en ĝi, foje okazigis malagrablaĵojn alparolante la elforajn gastojn en la mem elkovita hispana, de kiu Nigra Peĉjo sin servas je la 5-a de decembro, sed plejofte li malobstine toleris la multflankan idealismon de sia patrino.

„Ŝi estas iomete fneza”, li kelkfoje diris al mi.

Ĉar la familio estis nekredanta, ĝi fiere neglektis la kristanajn festotagojn, sed festis proprajn elstarajn momentojn, kiuj rilatis la sezonojn kaj havis nekonkretan folkloran tendencon. Mi foje vidis, ke grupeto da ĉe la patrino de Gerrit kunvenintaj samideanoj, dum kantado kaj kordludado devis serĉi de ŝi en la domo kaŝitan blankan fabograjnon, kunportante brulantajn kandelojn kaj dum kio ripete eksonis la gajaj ridoj.

„Jen, tiele nun ni festas”, polemike Sinjorino Puts diris al mi, ĉar ni manĝis viandon kaj foje iris en la kinejon. Gerrit dume mienis apatie.

Ankaŭ sur la kampo de la kuracarto ŝi iris sian propran vojon. Kuracistoj estis malestimataj. Kiam iu malsaniĝis, Sinjorino Puts venigis iun egulon kun ruĝa barbo de profeto kaj sen ia rajtigilo, kiu ĉiam promenis kun siaj nudaj piedoj en sandaloj, ĉar li, mi kredas, estis kontraŭ ŝtrumpetoj. Cetere li estis kontraŭ ĉio ajn, tial li perfekte harmoniis kun Sinjorino Puts. Malsanoj estiĝis el la animo — li diris — kaj li kuracis ilin per babilado ĉe la lito pri tiu nekaptebla parto de la homa korpo.

Kiam Gerrit estis deksesjara li ekhavis pulminflamon kaj mortis en semajno, kvankam la barbulo venis babilo ĉiun tagon. Sinjoro Puts ankoraŭ penadis dum du monatoj surtere en sia mantelo kaj tiam ankaŭ li metis la afablan kapon en la sinon. Lian kremacion mi ankoraŭ ĉestis. Sinjorino Puts aspektis sur Westerveld kverko, tempestita de la elemen-

MARTIN FIERRO

Argentina eposo — Serio: Oriento/Okcidento

Mendu ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Borniastr. 95, Leeuwarden. Ĝirkonto 76915

NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Prez.: S-ro H. Kervers, Van Slingelandtstraat 22, Den Haag.

Tel.: 0 70 - 54 21 86.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.

Tel.: 0 70 - 66 96 69.

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.).

Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Poŝtĝirakonto: 3 45 63 je la nomo de: Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver. L.E.E.N., Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid.

KONCIZE

„Emocia Esperanto”.

La juna nederlanda poetino Helen Knop per verkis poemaron kun la titolo „Emotioneel Esperanto” (Emocia Esperanto), eldono de Meulenhoff, Amsterdam ('66).

Fondo de Diapozitiva Servo de U.E.A.

S-ro Harri Melasniemi, Itäinenkatu 40 D 65, TURKU 6, Finnlando.

Bonvolu abunde subteni lin.

Speciala „Gronlanda” numero de „Norda Prismo”.

Ni volonte ankoraŭfoje atentigas pri la ebleco senpage ricevi ekzemplerojn de la speciala, al Gronlando dediĉita numero de „Norda Prismo”, la konata Esperanto-revuo el Skandinavio.

La enhavo estas tre varia kaj interesa, kun i.a. artikoloj pri fabeloj, lingvo, arto de la Eskimoj, Gronlanda filatelio, k.t.p. Oni turnu sin al la Dana Ambassadejo,

toj, sed ankoraŭ rekta. Ŝi estis ĉirkaŭita de samideanoj. Eĉ la homo kun la ruĝa barbo havis la kuraĝon veni; li estis netuŝita. Nelonge post tio ŝi iris loĝi en tiu vilaĝo kaj kiam mi antaŭ kelkaj jaroj renkontis ŝin antaŭ la domo, ŝia voĉo sonis malpli laŭte kaj estis kvazaŭ ŝia rigardo ĉiufoje fuĝvagis malproksimen. En tiu verando ŝi sidis senmove kaj rigardis en la nokton. Dio scias, kion ŝi vidis tie.

El „We leven nog” (Ni ankoraŭ vivas), kolekto da rakontetoj publicita en „Het Parool” sub la pseŭdonimo „Kronkel”.

TRAD.: R. SLOT.

adreso en Nederlando: Koninginnegracht 30, Den Haag. Bonvolu ne peti 2 ekzemplerojn, sed multajn por tuta klubo, kurso, rondo aŭ amikaro.

Estas preferinde, kiam oni petas alsendon, menci, ke stoko troviĝas en: Christiansborg, KOPENHAGO, ĉambro 22, La Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, Informa Fakto.

Por kiu interesiĝas pri „Norda Prismo” ĝenerale, ni donas la adreson de la administrado: Postfack 16, SKÖVDE, Svedlando. Oni povas ankaŭ aboni pere de nia propra libroservo.

La utilo de „Esperanto”-telefonnumeroj.

S-ro Hans Bakker sr., Amsterdam, ricevis el Pollando leteron de korespondemulo, kiu kiel adreson skribis sur la koverto nur: Nederlanda Esperanto-Asocio en Amsterdam! La poŝtvervo sendis la leteron al s-ro Bakker, dank' al la fakto, ke tiu ĉi menciigis en la telefonlibro sub la litero E: „Esperanto-voorlichtingsdienst” kun sia propra numero.

S-ro Bakker diras: „Laŭ la koverto mi povas konstati, kiom valora estas la mencio „Esperanto-voorlichtingsdienst”. Ĉi tiun valoron mi jam spertis sennombrajn fojojn. Eĉ de aliaj urboj en Nederlando oni alvokis min por informoj pri Esperanto”.

Ekzemplo certe imitinda en aliaj lokoj en Nederlando!

* *Esperanto-Informservo.*

Evoluiga Helpejo.

Sekve de la iniciato de s-ro J. A. Tuinder (vidu la artikolon en tiu ĉi numero) la Internacia Federacio por Evoluiga Helpejo en Wassenaar eldonos presitan broŝuron esperantlingvan.

